

Intervjuo kun Olivier Tzaut (4) pri la kanzon-arto en Esperanto Radioprelego de Claude GACOND, SRI 700, 1977.03.09 & 11 & 12

Cl.- Parolas Claude Gacond, kiu intervjuas Sinjoron Olivier Tzaut, la sekretario de la kampanjo 'Esperanto en la lernejojn'. Dum la tri intervjuoj, kiujn vi jam aŭdis, Sinjoro Tzaut ĉiam menciis la gravecon de la kantado en la instruado. Ni hodiaŭ parolu pri tiu ĉi temo iom detale. Sinjoro Tzaut, kion vi pensas, laŭ ĝenerala vidpunkto, pri la kanzonoj tradukitaj en Esperanton ?

OT.- Tre honeste, mi devas konfesi, ke mia repertuaro ne estas tre ampleksa, sed mi sufiĉe konas la temon por dir ke tro ofte la tradukoj estas malbonaj. Por taŭge traduki oni devas unue bone regi la lingvon. Sed ankaŭ : havi poezian senton, same kiel muzikan kaj ritman senton. Tio faras entute kvar neprajn kondiĉojn, kiuj tro ofte malfeliĉe ne estas kunigitaj en la sama persono. Laborante grupe oni povus tamen eviti la plej grandajn erarojn.

Cl.- Ĉu vi povus doni ekzemplon de mistradukado ?

OT.- Jes, volonte. En la 'Gaja kantaro' eldonita de la Esperantista Kulturdomo de Gresillon, en Francio, mi trovas : « Antaŭen vagas mi tra l'monto, al vi adiaŭ » - mi bedaŭras, sed tiu lasta akcento kiu estas sur la lasta silabo ne eblas. Oni diras : adiaŭ kaj ne adiaŭ. Alia ekzemplo kiun mi ne legis, sed aŭdis. Esperantistino lernis la jenan ludkanton : « Vi pasu la traderideridera, vi pasu tion al li senerari » mi esperas ke oni neniam presis tian tradukon ĉar ĝi estas vera katastrofo. La amikino ŝanĝis jene la ludkanton : « Donu vi al li la traderidera, tion donu vi al li sen erari » - granda progreso en la akcentado krom la fino, kiel vi povis konstati. Mi proponis do al ŝi ŝanĝi jene la finon, almenaŭ provizore : « Tion donu vi kaj nepre senerar' » tio ne estas tre bela, mi konfesas, kaj la rimo ne bonegas, sed ĉar temas pri ludkanto, ne tro gravas kaj almenaŭ ne plu estas fundamenta peko kontraŭ la lingva elparolado. Kaj multaj esperantistoj konas tiun alian katastrofon « Dek boteloj pendas de la mur' dek boteloj pendas de la mur' » - estas vere stulte, ĉar sufiĉus eta ŝanĝo en la muziko : « Dek boteloj » kun emfazo sur 'te'.

Cl.- Ĉu estas tipo de kanzonoj, kiujn vi ne ŝatas ?

OT.- Ho jes ! Mi pardonpetas ĉar eble mi ĉagrenigos multajn geaŭskultantojn, sed vere mi malŝategas la 'verdajn kanzonojn', kiuj parolas pri la verda stelo, verda standardo, la sankta harmonio, kaj tiel plu, kaj tiel plu, kaj tiel plu. Mi ŝatas la kanzonojn, kiuj pritraktas en Esperanto la kutimajn temojn de la vivo. Mi tre timas, ke la 'verdaj kanzonoj' nur forpuŝas la homojn, kiuj ricvas la malagrablan impreson troviĝi inter la anoj de sekto.

Cl.- Kiujn kanzonojn vi kutime kantas ?

OT.- Mi kutime kantas la kanzonojn esperantigitajn de Sinjoro Claude Piron el la folkloro de diversaj landoj. Ili estas belegaj. Claude Piron estas ĝuste tia homo, kiu havas samtempe mirindan konon de la lingvo kaj la senton pri poezio, ritmo kaj muziko, plus, kompreneble, certan genion, kiu estas la propraĵo de la vera verkisto.

Cl.- Ĉu vi jam registris tiujn kanzonojn ?

OT.- Jes, mi registris en taŭga studio 16 kanzonojn.

Cl.- Ĉu vi jam vendis sonbendojn aŭ kasedojn pri ili ?

OT.- Jes, proksimume 80.

Cl.- Ĉu vi intencas registri aliajn kanzonojn?

OT.- Jes, antaŭ la fino de la jaro mi havos verŝajne unu horan registraĵon kun almenaŭ 25 kanzonoj.

Cl.- Ĉu ĝi estos aĉetebla?

OT.- Jes, verŝajne tra la kanalo de la libroservo de la Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds.

Cl.- Ĉu vi ne ŝatus fari diskojn ?

OT.- Ho, jes, kompreneble, sed nunmomente tio estas nura projekto.

Cl.- Kaj nun ni aŭskultu unu el viaj kanzonoj!

OT.- Tre volonte. Jen meksikia populara kanzono tradukita de Claude Piron. Ĝi estas kantita de la amanto sub la fenestro de la amatino la matenon de la festotago. *(muziko)*

Cl.- Vi aŭdis intervjuon el Svislando. Claude Gacond parolis kun sinjoro Olivier Tzaut, la sekretario de la kampanjo 'Esperanto en la lernejojn'. Ĝis reaŭdo! Post tiu intervjuo vi aŭdu kanzonon kantitan de Olivier Tzaut.

OT.- Temas pri rusa cigana kanzono: 'Sur stepo moldava'. *(muziko)*

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012